

Esperanto en Svislando, 3-a parto
Poresperanta entuziasmo : Festo en La Tourne
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 440 1972.03.15 & 18

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

Dum prelegaro ni prezentas al vi historieton de la esperanto-movado en Svislando helpe de tekstoj, kiujn ni ĉerpas el la revuo *Svisa Espero*.

A.- La pasintan semajnon ni diris al vi, ke la apogo de la ĝeneva filozofo Ernest Naville havis grandan influon. Ĝi vekis la intereson favore al esperanto, unue de la franclingvaj svisoj, kaj post la dua Universala Kongreso de Esperanto, de intelektuloj en tuta Svislando. Ni hodiaŭ malfacile povas imagi la sukceson de la tiama propagando, kiun lerte gvidis tre kompetentaj homoj : inter ili ni menciis la pastoron Friedrich Schneeberger, prezidanto de Svisa Esperanto-Societo, kaj Edmond Privat, nelacigebla kursgvidanto. Ambaŭ senĉese veturis de unu urbo al alia por prelegi kaj malfermi kursojn.

Cl.- Por doni al vi ideon pri la tiama poresperanta entuziasmo ni legos al vi erojn el artikoloj de *Svisa Espero*.

A.- Ĝus post la dua Universala Kongreso de Esperanto la Ĝeneva Esperantista Grupo anoncis pere de la ĵurnaloj, ke la 20-an de septembro 1906 okazos en ĝia grupa kunveno publika konferenco. Aŭdu :

Cl.- « *Nu, kvaronon de horo antaŭ la malfermo, nia kunveno estis absolute plenigita je la aŭdantaro, kaj mi kontraŭvole estis devigata konsili al kelkaj amikoj ke ili foriru. Nun, la unuan fojon ni eltrovis ke nia kunveno estis tro malgranda.* »

A.- La saman tagon ankaŭ okazis prelego en la urbo Neuchâtel. Aŭdu la raporton :

Cl.- « *Tuj post la Kongreso, nia grupo rekomencis siajn regulajn kunvenojn ; la dudek el niaj anoj kiuj partoprenis la belegajn ĝenevajn festojn, fariĝis kompreneble ankoraŭ pli fervoraj ol antaŭe. La 20-an de septembro, S-ro Theophile Cart el Parizo paroladis pri Esperanto en la « Grande salle des conférences » (granda prelegejo), antaŭ 800 personoj. Tiu-ĉi parolado estis organizita kun la helpo de kvin el la plej gravaj lokaj societoj. La elokventa kaj konvikiga parolado de S-ro Cart tre favore impresis la publikon ; la « Journal de Neuchâtel » detale raportis pri ĝi.* »

A.- Jen pri la rezultoj de tiu parolado :

Cl.- « *La sabaton 22-an kaj dimanĉon 23-an de septembro, multe da personoj vizitis la grandan Ekspozicion Esperantan, en la « Collège de la Promenade » (tio estas lernejo) ; ili atente ekzamenis amasegon da libroj, gazetoj, fotografajoj, kaj dokumentoj diversaj. La grupo organizis du kursojn ; unu por la sinjorinoj farita de S-ro Jean Wenger, kaj unu por la sinjoroj farata de S-ro Georges Streole, instruisto, kune ili kalkulas 120 instruatojn.* »

A.- Jam antaŭ la dua Universala Kongreso de Esperanto la intereso por la internacia lingvo estis tre vigla. Jen ni citas por vi raporton el la sama grupo de Neuchâtel, kiu rakontas pri renkontiĝo intergrupa.

Cl.- « *Granda festa kunveno Esperantista okazis en la Tourne, dimanĉon 17-an de junio. Ni diru tuj ke ĝi estis granda sukceso. Proksimume 200 geesperantistoj de l' Kantono (precipe el la kvar Grupoj de Neuchâtel, La Chaux-de-Fonds, Le Locle kaj Les Brenets) estis favore akceptintaj la inviton de l' Neuchâtela Grupo. Bela kaj agrabla vetero kunhelpis la sukceson.*

A.- *Matene, de l' 10-a ĝis la 11-a horo la samideanoj alvenas el ĉiuj anguloj de l' Kantono per la plej diversaj veturaj rimedoj : iuj parte fervoje kaj parte piede, aliaj biciklete, ankoraŭ aliaj en veturiloj ornamitaj per verdaj flagetoj. Sur la Hotelo de la Tourne ankaŭ vidiĝas nia flago.*

Cl.- *Plezure oni konatiĝas kaj babiladas ; baldaŭ komenciĝas la tagmanĝo sub la arboj de l' hotela ĝardeno. Esperanto estas la sola oficiala lingvo de l' Kunveno ; en Esperanto S-ro Jean Wenger (Neuchâtel) salutas la partoprenantojn kaj deziras al ili bonvenon. S-ro Jules Wolf (La Chaux-de-Fonds) kaj F-ino Honner (Les Brenets) respondas dankante la organizantojn. Oni legas salutajn leterojn kaj telegramojn de niaj amikoj Schneeberger, Renard kaj Privat kaj de l' Rolle'a Grupo. S-ro Henri Stroele (Neuchâtel) deklamas la « Vojon ». S-ro profesoro Bonjour (Neuchâtel) toastas al la Esperantistinoj ; oni kantas ĥore la « Esperon » kaj fine oni entuziasme aplaŭdas teatraĵeton perfekte luditan de tute junaj infanoj.*

A.- *Poste ĉiuj kune aliras Tablett'on (estas belvidejo), por tie daŭrigi la feston. Tra la paŝtejoj kaj la arbaro, malvolviĝas la longa promenaro. En Tablette admirinte la iom nebulan vidaĵon, ĉiuj grupiĝas sur deklivan herbejon enkadrigitan de l' arbaro ; iom antaŭe, flagoj en teron plantitaj signas la scenejon. La dua parto de l' festo tuj komenciĝas. Oni atente aŭskultas du gravajn raportojn : unu de S-ro Dubois, lernejestro en Le Locle pri la komenco de l'Esperanta propagando en nia Kantono ; kaj alian de S-ro Ducommun, instruisto en Le Locle pri « Esperanto kaj la infanoj », kaj du toastojn de S-ro Favre (Le Locle) al la patrujo, de S-ro Henri Stroele (Neuchâtel) al D-ro Zamenhof.*

Cl.- *Sed jen kio plej plaĉis al la aŭdantoj : Juna Samideano el Neuchâtel, S-ro Yersin, bonege deklamas sian admirindan tradukon de la « Kaprino de S-ro Seguin », la konata rakonto de Alphonse Daudet. Niaj amikoj el la Montaro (La Chaux-de-Fonds, Le Locle kaj Les Brenets) montriĝas valoraj aktoroj ; flanke de kelkaj malgravaj ŝercaj scenetoj, ili lerte ludas du komedietojn : unu Esperantan kun unu franclingvan. En la unua, la « Hotelo de l' Verda Stelo », Esperantista hotelestro akceptas fremdajn samideanojn el ĉiuj partoj de l' mondo, kaj fine ankaŭ ĉarman virinon el la luno, kiu, ŝi ankaŭ, parolas Esperante ! La dua komedio titolita « La Déclaration » (la deklaro) estas tre amuza kaj sprita defendo de Esperanto. Ambaŭ komediojn verkis S-ino Houriet, sindonema Esperantistino el La Chaux-de-Fonds. »*

Cl.- *Tiuj renkontiĝoj kreis etoson, kiu poste favoris la malfermon de kursoj, kaj en iuj vilaĝoj de tiu regiono oni povis nombri pli ol 50 personojn, kiuj regule frekventis la grupan vivon. Sciu ke la saman dimanĉon ankaŭ disvolviĝis simila renkontiĝo en la ĝeneva kamparo.*

A.- *Vi aŭdis prelegon el Svislando.*

Cl.- *Parolis gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond. Ĝis reaŭdo !*